



# Norvega Esperantisto

ESP ERANTOBLADET

N-ro 8  
1963

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO  
ĈEFREDAKTORO: JOHAN HAMMOND ROSBACH

3-a periodo  
29-a (37-a) jaro  
Monata

## KONGRESO DE AMIKECO

Impresoj de la 48-a Universala Kongreso en Sofio

### BONVENIGAJ SALUTOJ

Jam ĉe la landlima barilo ni povis legi la unuan bonvenigan saluton: Super la vojo estis streĉita granda ŝtofa afiŝo kun la vortoj **BONVENON EN BULGARIO!**, kaj multaj malgrandaj Esperantaj flagoj ornamis la domojn je ambaŭ flankoj de la vojo.

Kiam ni veturis en la ĉefurbon Sofio, ni preskaŭ ne kuraĝis kredi niajn okulojn: La stratoj tra kiuj ni veturis, estis aleoj de Esperantaj flagrubandoj kaj kongresafiŝoj kiuj estis fiksitaj al la lampfostoj je ambaŭ flankoj. Antaŭ ŝtata grandmagazeno en la centro de la urbo estis kolosa afiŝo kiu donis detalojn pri la kongreso en la Bulgara.

Nia unua promeno tra ĉefstratoj de Sofio konfirmis la unuan impreson. La urbo faris sian eblon por esti dum unu semajno la ĉefurbo de Esperanto. En la fenestroj de ĉiuj restoracioj pendis bele desegnitaj afiŝoj en Esperanto. La vortoj variis, sed ĉiuj havis la saman amikan sencon: «Bonan venon en nian restoracion!», «Bonan

venon, karaj gastoj!», «Estu bonvenintaj en nia restoracio!», «Esperanto amikigas la popolojn». Kiu eniris, trovis ke specialaj tabloj estis rezervitaj por gastoj Esperantaj. Multaj vendejoj havis similajn afiŝojn.

De granda distanco ni povis legi el grandaj ŝtofafiŝoj sur la fasado de la ŝtata universitato, nia kongresejo, la frazojn «*Vivu la paco kaj amikeco inter la popoloj! Per Esperanto al amikeco kaj reciproka fido!*» — kaj la samajn frazojn en la Bulgara.

Dum la kongresa semajno ni povis ĉiam denove konstati ke ĉiu homo en Sofio sciis pri la kongreso, pri la lingvo Esperanto kaj pri ĝia valoro por tutmonda kompreniĝo. En la tramoj, kie kongresanoj veturis senpage per speciala karto, kaj sur la stratoj homoj proksimiĝis al ni por informiĝi pri Esperanto, pli ofte demandante en la Germana aŭ en la Franca. Ni povis aŭdi homojn paroli entuziasme inter si pri la internacia lingvo, kaj ni aŭdis gepatrojn klarigi fervore al siaj infanoj pri Esperanto.

(daŭr. p. 96)

## VERDA LUMO

### AL LA DEMANDO: ESPERANTO EN LA LERNEJOJ

Verdaj estis la foliarboj, kaj verda estis mia espero kiam mi meze de julio ekveturis al la sunplena lando Jugoslavio por partopreni la konferencon de la lernejoj, en kiuj Esperanto estas instruata.

Alproksimiĝante al la urbo Beogrado, la varmeco iĝis ĉiam pli sufokiga. Mi jam ektimis la kunestadon kun multaj homoj en la prelegejoj, kaj la laboron atendantan.

Tamen; spite de la granda varmeco mi renkontiĝis kun homoj instigaj kaj pretaj kontribui per ĉiuj eblaj fortoj por solvi la problemon: Esperanto en la lernejoj.

La konferenco estis aranĝita sub aŭspicio de Jugoslavia Nacia UNESKO-komisiono. Dum la inaŭguro ĝia reprezentanto firme konstatis la gravecon de Esperanto. Li konkludis per la espero, ke la interrilatoj inter la du organizaĵoj plifirmiĝu en la estonteco.

La inaŭguro okazis la tagon post granda tertremo en Skopje. Kortuŝa estis la iniciato de la sinjoroj Poulsen (Danujo) kaj Erbeta (Svisujo). Instigante al la partoprenantoj de la konferenco, laŭ saneblecoj, doni sian sangon al la vunditoj en Skopje, ili finis per la neforgeseblaj vortoj: «Ĉiam kiam kaj kie homoj renkontiĝis en la antaŭaj jarcentoj, fluis sango. Nia sango nun fluu por io utila — ĝi fluu por helpi la vunditojn en Skopje.» Tuj poste anoncis sin proks. 50 pedagogoj kaj profesoroj el 12 landoj. La nombro kreskis la postajn tagojn.

Dum la sekvantaj tagoj mi vidis la saman pretecon helpi al la konferenca laboro. La plej multaj faris sian plejebilon. Kontribuante per diskutoj,

ideoj kaj spertoj, ili blovis novan kaj freŝan aeron al la malfacile solvebla problemo.

Ĉiuj konferencanoj ricevis, antaŭ la komenco de la konferenco, tre belan libron entenante ĉiujn prelegojn. Per tio ĉiuj havis la eblecon trastudi la materialon kaj fari eventualajn rimarkigojn.

Multaj verŝajne demandas al si, kiamaniere iu konferenco povas solvi la problemojn dum nur 4 tagoj? Pere de la prelegoj kaj diskutoj flanke de la pedagogoj apartenantaj al lernejoj en kiuj Esperanto jam estas instruata, mi konvinkiĝis pri tio, ke la problemo estas solvebla.

Tamen: Por tiuj lernantoj, kiuj nun lernis kaj scipovas Esperanton en ekz. Jugoslavio, stariĝis nova problemo: La aŭtoritatoj tre favore donis la permeson, ke Esperanto estu fako en la lernejoj. Granda nombro de lernantoj do staras preta korespondi kaj kontaktiĝi kun alilandaj lernantoj-esperantistoj. Se la aliaj landoj ne povas agi paralele, tiel ke vere iĝos internaciaj kontaktoj, la aŭtoritatoj verŝajne ne ankoraŭfoje tiel favore subtenas nian laboron.

Multaj esperantistoj sentas ĉi tiun gravan respondecon. Inter ili troviĝas unu, kiun mi ŝatus mencii: la fondinto de la organizaĵo: «*Grajnoj en Vento*», sinjoro Erbeta el Svislando. La tasko de tiu organizaĵo estas kontaktigi la diverslandajn lernantojn unu kun la alia pere de iu gazet-sistemo. Ĉiu lernanto aŭ grupo de klaso verkas artikolon, faras desegnaĵon — prefere originalan, en 20 ekzempleroj. Pere de iu centro ili

(daŭr. p. 94)

## Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

Redakcio: Johan Hammond Rosbach,  
Hans Amund Rosbach

Adreso de redakcio: Boks 942, Oslo

Abonprezo: En Norvegujo kaj eksterlando: n. kr. 8,—.

Anonprezoj:  $\frac{1}{1}$  paĝo kr. 150,—  
 $\frac{1}{2}$  p. kr. 75,—,  $\frac{1}{4}$  p. kr. 38,—  
 $\frac{1}{8}$  p. kr. 19,—.

## La Laborplano

En nia numero 7, kiun vi ricevis antaŭ kelkaj semajnoj, vi povis legi pri la laborplano de Norvega Esperantista Ligo. Ni ne nur rekomendas al vi relegi ĝin nun, sed ni petas vin fari tion.

Tion farante ni permesas al ni substreki kelkajn erojn de la Laborplano, sed per tio ne deziras preferigi ilin ol aliajn erojn.

Ni montras al la alineo, kiu mencias plialtigon de norvega membro-nombro en UEA;

ni substrekas la instigadon al individua internacia utiligo de Esperanto per korespondado kaj abonado de eksterlandaj Esperanto-revuoj kaj -gazetoj. Koncerne ĉi-lastajn ni deziras speciale nomi tiujn, kiuj havas internacian karakteron — ekzemple *Revuo Esperanto*, la organo de UEA, *La Praktiko*, la organo de Universala Ligo, *Heroldo de Esperanto*, la memstara, grandformata gazeto, kaj *Norda Prismo*, la plej granda kaj plej aktiva revuo pri kulturo kaj literaturo;

ni akcentas la gravan rolon de nia gazeto kiel ligilo de ĉiuj norvegaj esperantistoj, kiel informilo pri la Esperanta mondo, kiel forumo de Esperanta debato, kiel podio por prezenti verkaĵojn en Esperanto;

ni ripetas la alvokon pri speciala atento pri la junularo kaj pri studentoj ĉe universitatoj kaj atllernejoj — efektive la junuloj ja estas tiuj, kiuj baldaŭ transprenos nian laboron kaj sukcesigos ĝin — por eterna beno.

## Sciigoj de N.E.L.

*Anoncoj en Norvega Esperantisto.* La kotizenspezoj ne sufiĉas por eldoni dek plenajn 16-paĝajn numerojn de Norvega Esperantisto en la jaro. Sed kelkaj anoncoj estus bona helpo. Ni tial petas la membrojn varbi anoncojn por nia gazeto. Vidu la anoncprezojn sur ĉi tiu paĝo.

*Kotizoj por 1964.* Por eviti interrompon en la ricevado de Norvega Esperantisto estas grave ke ĉiuj membroj pagos siajn kotizojn frue. Klubanoj bonvolu pagi al la kluba kasisto, rektaj membroj rekte al NEL, prefere jam antaŭ Kristnasko.

*U.E.A.-kotizoj 1964.* Por eviti interrompon en la ricevado de la Jarlibro kaj de la gazeto ESPERANTO ĉiuj Individuaj Membroj de UEA devas nun laŭeble baldaŭ pagi sian kotizon por 1964. Pagu al loka Delegito, aŭ rekte al la Ĉefdelegito por Norvegujo, s.ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118, Oslo-Bryn, poŝtĝirokonto 133 29. Ni rekomendas al ĉiuj membroj aboni la jarlibron kaj la gazeton de UEA. La kotizoj por 1964 estas: Membro-Jarlibro kr. 20, Membro-Abonanto (ricevas la Jarlibron kaj la gazeton *Esperanto*) kr. 40, Membro-Subtenanto (ricevas la Jarlibron kaj la gazeton) kr. 60.

49-a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Hago, Ne-

derlando dum Aŭgusto 1964. — Aliĝiloj estas riceveblaj de la Turisma Servo de NEL, Boks 942, Oslo. Pro specialaj cirkonstancoj rilate al la loĝigado estas necese ke oni aliĝos frue. Tial ankaŭ la 2a Oficiala Bulteno eliros pli frue ol kutime.

*Instruistoj kaj lektoroj!* Vi ricevis la rezolucion de la Landa Kunveno de NEL kun admono peti permeson efektiviĝi provinstruadon de Esperanto en via lernejo. Ni esperas ke vi ĉiuj faros vian eblon!

*La laborplano de NEL* estas publikigita en la pasinta numero. Ni atendas ke ĉiuj membroj bone studos ĝin kaj klopodos agi laŭ ĝi. Metu ĝin sur vian apudlititan tableton kaj ĉiutage rigardu ĉu vi faris vian eblon por plenumi iun punkton en ĝi!

*Taskotabelo por la kluboj.* — *Novembro:* La estraro sendas registritan informon al tiuj membroj, kiuj ne eksciis laŭ la statuto, sed de kiuj tamen revenis la poŝta enkasigilo sen pago, ke oni nun forstrekos ilin kiel klubanojn. La estraro admonas la klubanojn pagi kotizon por la venonta jaro, kaj la kasisto komencas enkasigi tiujn kotizojn. La Delegito de UEA ekkolektas UEA-kotizojn por la venonta jaro kaj varbas novajn Individuajn Membrojn de UEA. Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato.

*Raporto de la Liga Estraro pri la 3a jarkvarono 1963.* Okazis 2 estrarkunvenoj, kaj oni elsendis 1 cirkuleron al la kluboj. Laŭ la admono de la Landa Kunveno oni starigis Financan Komisionon, ki-

es membroj estas John Berggreen (prez.), Johan Matland, Alfred Skyberg, Kirsten Ek. La komisiono ellaboris laborprogramon kaj diskutis ĝin kun la Liga Estraro. Oni pretigis la rezolucion de la Landa Kunveno por dissendo al instruistoj kaj lektoroj. Astrid Mansrud reprezentis NELn ĉe la 48a Universala Kongreso en Sofio, la Registaro ne estis reprezentata, ĉar ne venis invito. Oni diskutis aranĝon de flugkaravano al la kongreso en Tokio 1965.


La Estraro.

## Skandinavio

Unu el niaj legantoj skribas al ni pri la vorto *skandinavoj*, opiniante, ke ĝi ne estas ĝusta, se oni uzas la formon *Skandinavio*, pro tio, ke *-io* ne estas oficiala sufikso. Oni diru *Skandinavio* — *skandinavianoj* aŭ *skandinavoj* — *Skandinavujo*. Jes, tio ja estas la malnova kanto. Sed nia leterkribanto pledas por la formo *Skandinavio*, kiu — li diras — plej konformas kun la evidente latina vorto Scandinavia.

Ni iomete studu la nomon Scandinavia, ĉar ĝi estas interesa. En tiu vorto nur la fina *-a* estas latina; *-avi* estas la praĝermana, gota, formo de la pranorvega *ey* (pli frue: *avi*), norvege *øy*, dane *ø*. *Scandin* estas derivita de *Skandja*, mallonga formo de Skandinavi. Ankaŭ ĉe Plinius oni trovas la formon Scandia. Tiel, *Skandinavio* signifas nur «Insulo Skandja». En la pranorvega lingvo oni ofte kuntiras Skandin al Skán [pron.: Skon], el kiu formo *Skáni*; tiel ankaŭ Skandin-avi al Skán-ey; ambaŭ nomoj signifas Skâne, Skanio.

JHR.



El  
niaj  
kolegoj

Inter la multaj esperanto-gazetoj estas ankaŭ iuj, kiuj ekskluzive aŭ grandparte uzas nacian lingvon. Kelkajn el tiuj oni ja povas pli-malpli kompreni, sed kiam ankaŭ la alfabeto estas tiel fremda, kiel tiu de la koreanoj, oni fine absolute cedas. Tamen — kelkfoje ni trafolumas. Kaj jen — en «La korea Junularo» el 1959 — ni trovas du literojn: OA. Ĉu vere, ni pensas. Kaj jes — en la tuta teksto ni trovas tri vortojn skribitajn per nia alfabeto. Estas: «Kontrabandisto». Kaj «Arthur Omre». Do: La novelo de Omre, kiu aperis esperantlingve en Norda Prismo, trovis la vojon al la korea lingvo. Espereble s-ro Omre ricevis ekzempleron.

«Homo kaj Kosmo» estas tute nova revuo, populara naturscienca, kvaronjara. Ĝin eldonas «Astronomia Observatorio de la Kroata naturscienca societo, Zagreb», kaj la jarabono estas 10 n. kronoj.

La revuo celas la junularon. Kaj la junularo certe trovas interesajn temojn: Kaj la homo kaj la kosmo ja estas en la centro de ĉies observo! Do ankaŭ legaĵo por la plenkreskuloj.

Sed ni ĉiam estas skeptikaj, tial ankaŭ nun. Alineo de la revuo diras: «La surtera edeno — ĉu realigebla? La eltrovo de la atoma (nuklea) energio prezentas mirindajn perspektivojn por la homaro: per la kolosa, preskaŭ neelĉerpebla atoma energio, post kelkdek jaroj, ĉiuj

maŝinoj de la mondo funkcius kva-zaŭ senpage. La homoj preskaŭ ne devus plu labori fizike — eble nur du-tri horojn en la semajno».

Nia skeptikismo ne rilatas al la eblecoj, sed al la «edeno». Niaj spertoj ja evidentigas, ke nelaborado estas la vojo al ĉio malbona. — Legu la revuon, tion ĝi meritas. Sed memoru, ke vi ĉiam devas distingi inter faktoj kaj ideologioj, inter bono kaj malbono.

«Esperanta Finnlando» 1/1963 havas kalkulan rubrikon. Kalkuloj ordinare estas neinteresaj, eĉ tedaj. Sed trankviliĝu: Ni citos eĉ nu unu ciferon.

La kalkulo temas pri la stato de eldona kaso, por eldoni «Kalevala'n». Oni kolektas antaŭmendojn, kaj per la 101 menditaj ekzempleroj (krom donita ekstra mono?) «ni povas komenci la kompostadon de la verko — por tio ĝi eĉ sufiĉas. Sed por la presado, papero kaj bindado, estas bezone kolekti ankoraŭ multe pli. La manko egalvaloras proksimume mil antaŭmendojn de Kalevala!»

Inter antaŭmendintoj estas menciitaj finnoj, finnoj loĝantaj en Svedujo kaj svedoj. Ĉu iu norvego antaŭmendis? Klubo al la biblioteko, la eldonejo por vendo, unuopuloj? Ni ne — tutsimple ĉar ni nenion sciis pri ĉi ĉio ĝis nun. Nun ni petas niajn finnajn amikojn: Skribu mallongan informon por N.E. pri kio estas Kalevala, kiu verkis ĝin, kiu tradukis ĝin, kiom ĝi kostos — kaj ĉu ne, iu norvego mendos?

«Bonvenon al DANMARK kaj al danaj junulargastejoj». — Jen bela, kvarpaĝa broŝuro kun 8 bildoj el danaj junulargastejoj. Ĝi alvenis nun, dum la «junulara jaro». — Kaj i. a. rakontas: «tranokta pago estas 2—3 danaj kronoj por lito kun du lankovriloj» kaj: «Esperanto estas, laŭ

nova decido de la dana registaro, permesita (libervola) fako en la danaj lernejoj, kaj ĉiam pli da infanoj lernas ĝin.»

Kiam io simila eldoniĝos en Norvegujo? (Kaj parenteze: Kiam la danoj nun komencis, kial ni ne daŭrigi, kaj tutsimple nomi nian landon «Norge»?)

\*

Nia gazetaro — jam sufiĉe abunda — de tempo al tempo pligrandiĝas. Ne ĉiam la pligrandiĝoj estas ankaŭ pliriĉiĝoj, kaj ofte ni pensas, sed vane: Kial oni ne el du aŭ tri tiuj gazetoj, baraktantaj pro malsolida ekonomio, povus krei unu vere bonan. Sed rigardante en nian propran landon, ni ja vidas, ke eĉ organizoj kun tute sama celo, samaj deziroj, kaj eble eĉ, almenaŭ parte, sama legantaro havas siajn proprajn organojn — ĉiam kun la vokokrio: Havigu al ni pli da abonantoj.

Nu, la esperantomovado ofte havas la saman problemon, naciaj sekcioj de iu mondorganizo aperigas «organojn», sama nacia movado eldonas junulan, oficialan k.t.p. gazeton.

Tamen, kelkajn novajn ni salutas kun ĝojo. Tiujn kun speciala celo. Kun bedaŭro ni adiaŭas la «Nica»n, kun ĝojo bonvenigas la Kulturan Revuon.

El Jugoslavio venas «Kajeroj de jugoslavia Esperanto-instituto». Tiuj kajeroj havas specialajn celojn:

«havigi al la esperantistoj studojn prilingvajn, priliteraturajn, necesajn ĉe sinpreparoj por diversaj ekzamenoj, kiu pro elĉerpiteco aŭ neaĉetebleco en nia kaj iuj aliaj landoj ne estas aliloke trovebla». La kajeroj aperos presitaj aŭ multobligitaj laŭ eldonnombro, kaj oni eldonos nur tiom, kiom oni elsendos. Oni akceptas «abonon» pere de 15 steloj, kiu estas pago por tiom da kajeroj kiom oni povas presigi por tiu sumo.

\*

Eble ni samtempe priparolu strangan anoncon en Heroldo. Tie oni decidis neniigi la restantan stokon de du libroj. Sed ĉar la esperanto-libroj neniam estas aĉetindaj dum ili estas aĉetebraj, oni decidis averti la esperantistaron antaŭe!

## VERDA LUMO —

(daŭr. de p. 90)

estas disdonitaj al alilandaj lernantoj, kiuj siavice reciproke sendas siajn gazetojn al ni.

Se la lernantoj aŭ la instruistoj ne mem scipovas Esperanton, ili povas kontakti esperantiston, kiu certe povas preni sur sin la etan taskon traduki la tekstojn.

*Tio estas vere bona ideo por laborigi la Esperantoklubojn en nia lando.*

Mi mem estas instruistino en la 5a klaso. En la komenco de la lerneja jaro, mi forte instigis al la knaboj komenci la laboron. Nun la gazetoj jam estas pretaj. Mi montris ilin al nia lernejestro. Li tiel interesiĝis pri nia laboro, ke li donis al mi la permeson gvidi kurson pri Esperanto pere de la «ŝatokupoj» 1 posttagmezon ĉiusemajne. En mia kurso, kiu komenciĝis hieraŭ, aliĝis 25 knaboj — do, preskaŭ mia tuta klaso.

Norvegujo estas malgranda lando ĉe la limo de la kontinento. Mi forte akcentas la gravecon de ĉi tiu laboro por interkompreniĝo inter la popoloj.

Se ĉiu esperantisto kiu mem estas pedagogo, aŭ kiu konas pedagogojn (certe estas multaj), nun agas paralele, ni post mallonga tempo povas ŝanĝi la ruĝan lumon per la verda lumo al la demando: ESPERANTO EN LA LERNEJOJ.

La konferenco akceptis tri rezoluciojn:

På  
norsk



*Esperanto-gudstjenester i 50 år.*

London: En søndag i hver måned blir det holdt gudstjeneste på Esp.-o i den franske protestantiske kirken i Soho Square. Disse internasjonale gudstjenestene, som har holdt til i forskjellige kirker i London i årenes løp, kunne nylig feire 50-årsjubileum.

I gudstjenestene har det ikke bare deltatt esperantister som er bosatt i London, men også tilreisende fra alle verdensdeler: forretningsfolk, kunstnere, vitenskapsmenn, studerende og turister.

Det benyttes salmebok på Esperanto. Den første utgaven av Bibelen på Esperanto utkom i England for mange år siden, med det gamle testamentet oversatt direkte fra Hebraisk av doktor Zamenhof.

*Esperanto på ungdomsherbergene.*

De som baserer feriene sine på overnatting på ungdomsherberger, pleier å komme i kontakt med ganske mange nasjoner i løpet av en liten sommerferie, selv om turen går innenfor hjemlandets grenser. Språk-

1 al ĉiuj registaroj  
1 al la tutmonda instruistaro, kaj  
1 al UEA

Mi ne volas formeti mian plumon antaŭ ol danki la iniciantojn kaj la respondeculojn de la sukcesplena konferenco: gesamideanojn Vukomanovic Zlatnar kaj iliajn helpantojn, kiuj tiel diplomate kaj senlace aranĝis kaj gvidis la konferencon.

*Astrid Mansrud.*

vanskelighetene betyr imidlertid for mange en hindring for riktig kontakt med utlendinger. Enkelte ungdomsherbergeforbund har tatt i bruk Esperanto i herbergefortegnelse. Dansk Vandrelaug har skaffet medlemmene sine et innblikk i det internasjonale språket gjennom et lynkurs i medlemsbladet.

Nå er det sendt ut en folder på Esperanto — «Bonvenon al Danmark kaj la Danaj junulargastejoj» — Velkommen til Danmark og de danske ungdomsherberger. I tekst og bilder forteller folderen om vandrebevegelse og ungdomsherberger i Danmark.

Det norske ungdomsherbergeblad hadde nylig en artikkel av den danske vandrehjemspionéren, skoleinspektør Stig Hansen, med oppfordring til å gå i gang med å lære Esperanto for å kunne bruke det i ungdomsherbergene.

*Esperantogater i mange land*

Universala Esperanto-Asocio's forskningssenter i London har fullført en undersøkelse om gater og plasser som har fått navn etter Esperanto eller etter doktor Zamenhof.

Resultatet foreligger i form av en fullstendig fortegnelse over alle Esperanto-gater og Zamenhof-gater og -plasser i verden, i alt 216 i 18 land. Blant disse landene leder Frankrike med 43, deretter følger Brasil med 33 og Italia med 23. Norge og Danmark er ikke med; men Sverige er representert med Esperanto-plassen i Göteborg.

Undersøkelsen er ført à jour til 31. oktober 1962. Flere bver er kommet til senere, senest Uberlandia i Brasil, Montelimar i Frankrike, Pistoia i Italia og Tananarive på Madagaskar.

## KONGRESO DE AMIKECO

(daŭr. de p. 89)

*Interkona Vespero kaj Solena Inaŭguro*

Kiel kutime la kongresanoj kolektiĝis jam en la Sabata vespero por interkonatiĝi. En Sofio la «*Interkona Vespero*» okazis en Universiado, la plej granda sporthalo de Bulgario. Tiu halo, kiu havas pli ol 3500 sidlokojn, estis ankaŭ la kunvenejo por la Solena Inaŭguro, Bulgara Arta Vespero, Internacia Arta Vespero, Oficiala Akcepto de la Urbeŝtato, Kongresa Ballo kaj Solena Fermo. Kvankam la halo estis grandega, estis iom malfacile tie retrovi malnovajn kongresamikojn aŭ konatiĝi kun multaj novaj kongresanoj, ĉar oni restis pli malpli ligita al sia sidloko, kiel en la teatro. La Loka Kongresa Komitato evidente antaŭvidis tion kaj estis aranĝinta sufiĉe ampleksan programon de muziko, kanto kaj diversaj distraĵoj sur la podio.

Kiel en antaŭaj Universalaj Kongresoj la *Solena Inaŭguro* ĉefe konsistis el paroladoj, kaj kiel en la antaŭaj kongresoj neniu kongresano laciĝis pro la multaj paroladoj, ĉar la parolantoj parolis kun la sento ke ili portas mesaĝojn al la multnacia aŭskultantaro.

Ni aŭdis malfermajn parolĵojn de nia prezidanto, profesoro Hideo Yagi, bonvenigan paroladon de la prezidanto de LKK, Nikola Aleksiev kaj salutparoladon en la Bulgara de unua vicĉefministro Georgi Trajkov kun traduko de Nikola Aleksiev. Liaj afablaj kaj amikaj parolĵoj estis ofte interrompataj de forta aplaŭdado, kaj laŭ ĉarma kutimo de la lando la parolanto mem entuziasme partoprenis la aplaŭdado.

Inter la salutantoj de la naciaj asocioj estis nia Astrid Mansrud en

nacia kostumo el Gudbrandsdal, kiu ricevis merititan aplaŭdon, ankaŭ pro bona kaj mallonga saluto.

La kulmino de ĉiu solena malfermo kutimis esti la kongresa festparolado. En la kongresoj de la lastaj jaroj la ĝenerala sekretario de UEA faris tiun paroladon. En ĉi tiu kongreso la ĝenerala sekretario ne ĉeestis, kaj multaj estis scivolemaj, kiu estos la festparolanto, ĉu en la Jaro de la Junularo iu junulo, ekzemple Karlo Minnaja, ĉu iu esperantistino, ĉu iu reprezentanto de alia kontinento? La paroladon faris la novelektita prezidanto de nia Akademio, G. Waringhien, kiu donis mallongan resumon pri la rolo kiun ludis la Bulgaroj en homara kaj Esperanta kulturoj.

Du okazaĵoj de la Solena Inaŭguro meritas specialan mencion, ĉar ili certe konsiderinde kontribuis al la samtempe solena kaj gaja etoso. Post la malfermaj parolĵoj de profesoro Yagi la Infana Kongreseto, 60 infanoj el 10 landoj, diverse vestitaj, sed ĉiuj kun verda koltuko, plenigis la ŝtuparojn de la podio.

Komune ili kantis la kanton «Esperanto estas la lingvo por ni», kaj unu el ili, 14-jara Bulgara knabo, per laŭta klara voĉo salutis la kongreson en la nomo de la kongreseto. Post tio centoj da Bulgaraj infanoj en naciaj kostumoj enkuradis tra la flankaj pordoj kaj kolektiĝis antaŭ la podio, el kie ili salutis la kongreson per kantoj kaj per parolĵoj. Kaj la Infana Kongreseto kaj la Bulgara infanaro vekis entuziasmon ĉe la kongresanaro per siaj salutoj, kaj ambaŭ grupoj ricevis tondran aplaŭdon.

*Kongresa semajno*

Dum la kongresa semajno okazis interalie

5 kunvenoj de la Komitato de UEA

7 prelegoj en la Internacia Somera Universitato

2 ĝeneralaj kunvenoj de UEA

5 teatraj prezentadoj

2 artaj vesperoj

Ekspozicio de foto-konkurso

Blindula kongreso

Infana Kongreseto

Belarta konkurso

Konkurso pri deklamado

Oratora konkurso

Cseh-seminario

Junulara vespero

Granda nombro da fakkunvenoj

Multaj ekskursoj al proksimaj kaj malproksimaj regionoj.

Por detale raporti pri ĉio oni devus disponi pri kelkaj numeroj de Norvega Esperantisto, kaj cetera neniu unuopa esperantisto povus ĉion ĉeesti. Laŭ tio kion mi mem povis vidi kaj laŭ tio kion mi aŭdis de aliaj kongresanoj, ĉiuj aranĝoj estis tre sukcesaj kaj laŭ kvalito kaj laŭ nombro de ĉeestantoj. Mi konsilas al ĉiuj legantoj de Norvega Esperantisto ke ili ankaŭ legu la pli ampleksajn raportojn en niaj internaciaj gazetoj, Esperanto kaj Heroldo de Esperanto. La Universalaj Kongresoj apartenas al niaj plej bonaj argumentoj en la informado pri Esperanto, kaj ĉiu aktiva esperantisto devus esti bone informita ĝuste pri la kongresaj okazaĵoj.

El la kongreslibra paĝo pri 5. Aŭgusto ni povis legi ke «La Urbeŝtato akceptas reprezentantojn de la Kongreso», kaj piednoto atentigis ke «la LKK estas devigita elekti kiel reprezentantojn de la kongreso partoprenantojn kiuj havas respondecan funkcion en la Esperanto-movado kaj en la kongreso mem». Neniu trovis invitkarton en sia dokumentara koverto, kaj multaj estis scivolaj pri tio ĉu ili apartenos al la elektitaj. En la lasta momento la LKK publikigis ĝojigan sciigon de la Urbeŝtato: Ĉiuj kongresanoj senescepte estas invititaj

ĉeesti akcepton en Universiado. Tie la vicprezidanto de la urba konsilantaro salutis nin en la nomo de la ĉefurbo kies devizo estas «Ĝi kreskas, sed ne maljuniĝas». Post dankparolado de profesoro Yagi la kongresanoj estis abunde regalataj per ĉiaj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj: buterpanoj, viando, fiŝo, kolbasoj, kukoj, fruktoj, glaciaĵo, limonadoj kaj vinoj.

Ankaŭ la *Infana Kongreseto* akceptis nin, kaj tie la abunda regalado konsistis el granda programo de skeĉoj, kantoj kaj dancoj. La prezentado komenciĝis en subĉiela teatro apud junulara domo kun granda ŝtofafiŝo «Per Esperanto por paco kaj feliĉa infaneco»; sed subita pluvego kun fulmotondro devigis ludantojn kaj rigardantojn fuĝi en la domon mem. Ĉiu infano lerte plenumis la taskon donitan al ŝi aŭ li, sed ankoraŭ pli valore estis por la rigardantoj povi konstati la bonan kontakton kaj komprenon inter la infanoj sur la scenejo kaj ekster ĝi.

En la *Oratora Konkurso* partoprenis 9 gejunuloj el 9 landoj. Inter ili estis Otto Prytz, kiu kelkajn tagojn antaŭe gajnis la unuan premion en la oratora konkurso de la junulara Esperanto-kongreso en Vraca. Ĉiuj konkursantoj faris tre bonajn paroladojn, kaj dum ni atendis la decidon de la juĝantaro, ni aŭdis tre diversajn opiniojn pri la nomo de la gajnonto. Finfine ni eksciis la rezulton: La unuan premion ricevis Stanislaw Swistad el Pollando, la duan kaj trian Kyotaro Deguchi el Japanio kaj Diccon Masterman el Grandbritio.

La Komitato de UEA en siaj kunvidoj pritraktis diversajn raportojn kaj proponojn. La diskutoj ofte montris diversecon de opinioj, sed ĉiam okazis en plena harmonio, kaj ĉiuj diskutantoj montris fortan volon kompreni ankaŭ la argumentojn de

la aliaj. Unu el la decidoj de la komitato estis ke ĝi mallongigis sian mandaton, tiel ke ĝia laborperiodo estos 2-jara anstataŭ 3-jara, kaj novaj elektoj por ĉiuj kategorioj de komitatanoj okazos en 1964. Alia decido tuŝas la kotizojn de rektaj membroj. Sed pri tio kaj pri aliaj decidoj oni povos legi kiam Norvega Esperantisto ricevos la oficialajn tekstojn de UEA.

La kongreso en Sofio donis al multaj esperantistoj el Orienta Eŭropo la unuan ŝancon partopreni Esperantan kongreson. Oni havis la senton ke per tio la kongreso fariĝis pli vere Universala ol la antaŭaj. Espereble tiu pli granda Orient-Eŭropa partopreno daŭriĝos en la venontaj kongresoj. Kelkaj esperantistoj el Orientaj landoj esprimis la opinion ke post la kongreso en Sofio oni povos atendi pli grandnombrajn kongrespartoprenon el iliaj landoj. Multaj aliĝis al la venontjara kongreso en Hago dum ili estis en Sofio.

Ĉar mi nun venis al la temo Oriento-Okcidento, mi ne deziras fini sen kelkaj vortoj pri la demando kiun mi tiel ofte aŭdis post la reveno el Sofio: Kiel pri la politika propagando? Ĉu ĝi ne ĝenis la kongreson? — La respondo estas facila: La kongresaj kunvenoj kaj aranĝoj okazis tute en la reĝisorado de Universala Esperanto-Asocio. Oficialaj salutantoj kelkfoje diskrete menciis «la nunan sistemon» aŭ eĉ la socialisman sistemon, sed neniel propagandis. Ni aŭdis entuziasmajn vortojn pri paco kaj interkompreno, sed almenaŭ mi neniam dum la tuta kongreso aŭdis aludon ke iu lando aŭ nacio estas pli malpaca aŭ pli paca ol la aliaj. Por kongresanoj kaj nekongresanoj en Sofio la 48-a Universala Kongreso estis kongreso de amikeco.

Ludvig Anjer

## RECENZOJ

### «Ŝipestro rakontas»

F. T. Lundquist: Ŝipestro rakontas. 72-paĝa, nebindita libro. Eldonis: Eldona Societo Esperanto, Malmö, Svedujo.  
Lingve kontrolita de C. D. E. Capp.

Se oni volas juĝi ĉi tiun debutan libron, oni devas unue konsideri laŭ kiuj kriterioj ĝi estu juĝata. Se vi serĉas altnivelan literaturon, vi ne trovas ĝin. Se vi serĉas distron dum kelka tempo, vi ĝuos la rakontojn. Se vi kredas, ke temas pri romano, vi eraras, same ĝi ne estas ia membiografio.

Rigardu al la enhavolisto, kaj vi trovas, ke la libro dividiĝas en kvar «ĉapitroj», iom longaj. La unua, duono de la tuta libro, rakontas pri la junaĝaj aventuroj, pri la diktatoreca, kruela sinteno de la ŝipestroj k.t.p., kaj certe donas pravan bildon el la velŝipa tempo, kiam la ŝipestro estis aŭtokrata reĝo de sia ŝipo. Sed, mi devas konfesi, mi ne klare komprenas la rangsekvon inter la «kapitano» kaj la «ĉefo» — kiuj estas du personoj.

La dua ĉapitro «En sudaj maroj» ankaŭ okazas dum la junaĝo de la aŭtoro, dum la du I-staj, «Kristnaska antaŭvespero sur la Norda Maro» kaj «Alia Kristnasko» okazos dum reciproke la unua kaj la dua mondmilitoj.

Kapitano Lundquist do havas sufiĉe da episodriĉa rakontmaterialo por krei distran libron, kaj li scias rakonti. La lingvaĵo estas bona, sed iom tro piprita per anglaj esprimoj. Pri tiuj la eldonejo klarigas: Ili «ne tiel multe volas klarigi la signifon de la esperantaj esprimoj kiel doni impreson pri la lingvo de la maristoj.» Nu, bone; kiu krome kredus, ke «Liverpool pantiles» estas klarigo de la esperanta esprimo «malmolegaj keksoj»? Aŭ ĉu

iu pli bone komprenas la anglan «Harriet Lane» ol la esperantan «konservita ŝafviando». Pli ol duono de tiuj esprimoj tamen estas tiaj, ke ili servas nek al klarigo, nek al impresigo pri marista lingvo.

Aspekto de la libro, ekstere kaj interne, estas plaĉa.

Haro.

## 49-a Universala Kongreso de Esperanto

DEN HAAG, 1.—8. Aŭgusto 1964  
Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam —2, Nederlando

Sub la Alta Protektado de  
Ŝia Moŝto Juliana,  
Reĝino de Nederlando

KOTIZOJ ĝis 31. decembro 1963:

	gld.	stel.
Kongresano .....	45,—	180,—
Edz(in)o de kongresano	22,50	90,—
Junul(in)o		
ne pli ol 20-jara ....	17,—	68,—
Universitata student(in)o		
de 20 ĝis 30-jara ....	28,—	112,—
Blindul(in)o .....	22,50	90,—
Gvidanto de blindulo rajtas ne pagi la aliĝon.		

### RABATOJ

Plenaĝaj aliĝintoj, kiuj estas Individuaj Membroj de UEA (t.e. ricevas minimume la Jarlibron) rajtas rabaton de 5 ned.gld. (20 steloj). Edz(in)o de membro rajtas rabaton de duono de tiu sumo. La rabato ne validas por aliaj familianoj, studentoj, blinduloj kaj kiu ajn alia kategorio de kongresanoj.

### UNUA BULTENO

La 8-paĝa elegante eldonita Unua Bulteno de la 49-a Universala Kongreso, kun bildoj pri Hago, listo de Perantoj kaj provizora programo, estas senpage ricevebla, kune kun la

aliĝilo, ĉe la Perantoj kaj ĉe la C. O. de UEA.

### PROVIZORAJ PREZOJ

En Den Haag la prezoj por tranokto estas de 6 ĝis 30 gld. (24—120 steloj). Normala simpla manĝo kostas 3—4 gld. (12—16 steloj). La definitivaj prezoj pri loĝado troviĝos en la Dua Bulteno.

NB. Den Haag/Scheveningen estas grandega turista centro, tial estas necese eksterordinare frue rezervi loĝejon. L.K.K. povos garantii litojn nur ĝis la 1-a de aprilo. En kunligo kun tio la Dua Bulteno aperos pli frue ol kutime.

### EKSKURSOJ

Ekskursoj okazos i.a. al Amsterdam, al Rotterdam, al la regiono de la novaj polderoj (sekigita Suda Maro), al la Delto-verkoj (projektitaj post la akvokatastrofo de 1953) ktp. Multaj famaj, pentrinaj kaj interesaj lokoj estos vizitataj.

### INFANA KONGRESETO

Ĝi okazos en la belega konferencejo «De Tempel», la sama loko, kie en 1960 okazis la TEJO-kongreso. Granda, bela, domo, praktike aranĝitaj dormejoj, ludsalono kun scenejo, vasta parko kun sennombraj eblecoj por ludoj. Loko, kie la gepatroj kun plej granda fido povos lasi siajn infanojn. — Petu aliĝilon kaj pliajn informojn!

### STATISTIKO

(ĝis 13.9.63) Argentino 1, Aŭstralio 2, Aŭstrujo 1, Belgujo 3, Brazilo 2, Britujo 10, Bulgarujo 253, Ĉeĥoslovakujo 5, Danlando 4, Finnlando 2, Francujo 27, Ganao 1, Germanujo 10, Hispanujo 2, Hungarujo 50, Israelo 1, Italujo 3, Japanujo 3, Jugoslavio 41, Nederlando 27, Norvegujo 3, Nov-Zelando 1, Pollando 83, Sovetunio 1, Svedujo 6, Svisujo 1, Usono 4. Entute: 547 el 27 landoj. (Pasintjare ĉ. 150).

MARJORIE BOULTON:

## Kredu, se vi volas

Stefano Streko, kasisto de la loka Esperanto-Grupo, estis homo, kiu vivis modere kaj modeste, sed vendrede vesperon li tamen iris al drinkejo, ne nur por sensoifigi sin, sed ĉar li sentis la bezonon de iu ĥemia konsolito. Tie li sidadis, kun glaso da biero, kaj melankolie meditadis. Li estis sola en la varma ĉambro, same sola, kiel la lasta krono en la grupa kaso.

Verdaĵoj ne kreskas sen akvo kaj humo, — kaj esperantaĵoj malfacile kreskas sen mono. Inter la grupanoj ne troviĝis eĉ unu riĉulo. Ili jam provis multajn honestajn rimedojn por enspezi, kaj pri malhonestaj rimedoj neniu havis fakan kompetentecon. Dume, kaj urĝe, ili bezonis aŭtojn, flugfoliojn, novan flagon, gazetanoncojn, librojn por la grupa biblioteko kaj eĉ bretaron por anstataŭi la fruktokestojn, kiuj ne tre digne loĝigis ĝin.

Alia homo envenis, kun hundo, kiu aspektis tre inteligenta, sed kies speco ŝajnis esti strathazardseria. Li mendis bieron kaj eksidis apud Stefano. Levante la okulojn por saluti, li rimarkis la verdstelan insignon.

«Vi estas do esperantisto, ĉu?»

La vivo ŝajnis iom malpli griza.

«Jes,» diris Stefano, «kaj mi ĝojas renkonti samideanon. Ĉu vi estas vizitanto al nia urbo? Ni havas viglan grupon.» Li ne sentis ian devon aldoni «sed malriĉan».

«Fakte mi forlasos la urbon morgaŭ kaj vojaĝos al Usono,» respondis la sinjoro. «Ĉu vi konas iun, kiu deziras aĉeti hundon? Mi akceptus malgrandan prezon, kondiĉe ke la besto iru al bona hejmo. Mi ne povas kunporti ĝin, kaj mortigi ĝin estus al mi netolereble.»

«Mi ŝatas hundojn,» diris Stefano, «sed la vivo estas por mi jam iom tro komplika. Ĉu fakte vi esperas, ke iu pagos vin? La hundo aspektas ĉarma kaj simpatia, sed nepre ne estas ras-hundo.»

«Ne,» respondis la alia, «sed ĝi estas io pli interesa; ĝi estas mutacia hundo.»

«Muta? Mi preferus hundon, kiu kapablas boji.»

«Ne muta, sed mutacia. Mi aĉetis ĝin de atomfizikisto. La aliaj en la hundidaro estis monstroj, sed tiu ĉi hundo estis alimaniere stranga.»

«Mi petas vin,» diris la hundo, «ne memorigu min pri la tragedio de miaj kompatindaj gefratoj.»

Stefano preskaŭ defalis de sia seĝo. Poste li timeme rigardis sian glason; sed li fintrinkis eĉ ne unu glason da malforta biero. Post longa paŭzo, li finfine ekkonsciis, ke lia buŝo restis malfermita, kaj fermis ĝin.

«Jes, mia hundo kapablas paroli Esperanton! Ĉu vi deziras provi?»

Stefano malsekigis sian buŝon, poste demandis, «Sinjoro hundo, ĉu vi ankaŭ legas Esperanton?»

«Ne,» diris la hundo, «ĉar miaj okuloj ne taŭgas.»

«Ĉu vi kapablas prelegi al iu grupo?»

«Jes, se mi havus taŭgan temon. Sed mi scias nenion pri sciencoj, kaj mi neniam vojaĝis ekster tiu ĉi lando.»

«Antono povas ankaŭ kanti,» diris la nekonatulo.

«Sinjoro hundo, e... Antono... ĉu vi konsentos kanti por mi?»

La hundo kantis, ne tre virtuoze, sed tute rekoneble, unu strofon de *La Vojo*, unu strofon de *Ĉiu, Ĉiu, Ĉiu* kaj unu strofon de *Feliĉa Vagemuĉo*.

«Mi multe dankas vin,» diris Stefano.

«Estas plezuro al mi,» respondis la hundo afable. Sed ĉefe plaĉas al mi, deklami poemojn. Ĉu vi deziras aŭdi min?»

«Mi petas vin.»

La hundo deklamis interesan specimenaron el la verkoj de Kalocsay, Baghy, Auld, Thorsen kaj Ragnarsson.

«Ĝia stoko ne estas tre granda,» la nekonatulo diris, «ĉar mi devas mem laŭtleĝi ĉion al ĝi.»

«Sed estas miraklo! Ĉu vi iam pripensis la eblecon, ke via hundo kandidatiĝu por la Internacia Ekzameno?»

«Ne estus eble, ĉar ĝi ne kapablas skribi.»

«Ĉu mi deklamu plu?» demandis la hundo.

«Ne nun, Antono, ĉar ni devas konversacii pri aliaj aferoj. — Antono vere ege ĝuas deklamadon.»

La kapo de Stefano iom turniĝis; sed antaŭ li ŝvebis bela vizio, vizio altruisma, edifa, esperiga; li antaŭvidis vastajn monsumojn por la grupa kaso por la landa organizo, eble ankaŭ por ĉiuj fakoj de UEA. Aĉeti tiun unikan hundon per propra mono kaj laborigi ĝin en la servo de Esperanto! Li facile repagus sin; temus nur pri investo; sed poste venus rivero de riĉeco.

«Kian prezon vi postulas kontraŭ Antono?» li demandis.

«Mi devas foriri morgaŭ frumatene; kaj vi estas esperantisto, — do mi proponos al vi tre moderan prezon: ducent kronojn.»

Stefano devis konsenti, ke tio estas ja modera prezo por tia hundo; sed pro sia memestimo, li diris, «Nu... cent okdek kronojn.»

«Cent naŭdek — vere Antono tiom valoras.»

Ili facile interkonsentis; kaj Stefano, iom trema ĉe la genuoj kaj sentante sian kapon malagrabla su-

perplena, kondukis Antonon hejmen.

«Mi esperas, ke vi povas manĝi fiŝaĵon,» li diris, «ĉar viandon mi povos aĉeti nur morgaŭ.»

«Tute ne ĝenu vin,» la hundo respondis, «la fiŝaĵo odoras sufiĉe freŝa. Sed bonvolu doni al mi pelvon da akvo.»

Stefano tre volonte faris tiun bagatelan servon kaj aranĝis por la hundo provizoran liton el du malnovaj litkovriiloj en lignokesto. Kiam Antono ŝajnis kontenta, Stefano iris al sia propra lito, sed dum du-tri horoj ne povis dormi. Li revis pri grandiozaj propagandaj kampanjoj, pri televidaj kursoj pri Esperanto, pri subvenciitaj mondvojaĝoj, pri amaso da eldonaĵoj, pri belega infangazeto esperanta...

Sabate vespere, li kondukis Antonon al alia drinkejo, kie multaj homoj amuzis sin post la semajna laboro, kaj estis en tia humoro, ke ili facile elspezos monon. Li sukcesis sin meti en la konversacion, kaj lerte elektis sian momenton por diri ion pri Esperanto. Oni montris ian neintensan intereson, formale aprobis la utilan lingvon kaj volis reiri al sportaj temoj. Tiam Stefano diris:

«Mia hundo kapablas paroli Esperanton.»

Hore oni respondis per diversspecaj neoj. «Fromaĝo!» «Sensencaĵo!» «Blago!» «Nepre ne!» «Mi ne naskiĝis hieraŭ!» «Mi ne plu suĉas laktobotelon!» «Kuiru ĝin!» «Ĉu do lingvo por hundoj?» «Ne moku nin!»

Serene Stefano respondis, «Mi vetos dek kronojn, ke mia hundo kapablas paroli Esperanton.»

«Kaj mi vetos dek kronojn, ke ĝi ne kapablas.» «Kaj mi.» «Kaj mi.» «Ankaŭ mi.» «Ne prenu lian monon; li estas freneza.»

Stefano demetis kvardek kronojn kaj ordonis al Antono, «Nu, parolu, Antono!»

Antono silentis. (daŭr. p. 104)

## La 15-a IFEF-Kongreso en Stoke-on-Trent, Anglujo, 11a—17a de majo 1963

De la 11a ĝis la 17a de majo okazis la 15a kongreso de Internacia Federacio Esperantista Fervoĵista en Stoke-on-Trent en Anglujo. Partoprenis ĉa. 400 homoj de 16 diversaj landoj. De Norvegujo partoprenis la 2 elektitaj delegitoj, nome la prezidanto de Norvega Esperanta Fervoĵista Asocio (NEFA): Per Johan Krogstie, Løten, kaj la prezidanto de la fervoĵista Esperantoklubo de Oslo: Gunnar Flenvang, Oslo; cetera partoprenis Johan Sandersen kun edzino, Halden.

De Oslo ni vojaĝis per trajno al Hoek van Holland, de kie ni daŭrigis per pramŝipo al la angla havenurbo Harwich. Denove ni vojaĝis per trajno de Harwich al Londono, kie atendis nin sur la stacidoma kajo en Liverpool Strato-stacidomo, la delegito de UEA, Philip Buttinger.

La esperantistoj en Londono aranĝis por ni ekskurson al la ĉefurbaj vidindaĵoj. Ni dividiĝis en 2 grupoj, unu el ili gvidis d-ro Mildwurf, la alia, en kiu ni partoprenis, gvidis la delegito de UEA en Ilford, s-ro Frank Rogers. Sub lia bonega gvidado, ni vizitis la katedralon Westminster Abbey, registaran domaron en Downing Strato, kaj Big Ben, kies sonorilojn ni tuj rekonis de la militaj jaroj, kiam ni kontraŭleĝe aŭskultis programojn de la Brita Radio. Per ekskursboato ni fine vojaĝis laŭ la rivero Tameso de la Westminster-ponto al la kastelo Turo de Londono (Tower of London).

La kongresejo estis en la urbdomo, La Reĝa Halo (Kings Hall). Vespere okazis la interkonatiĝa vespero kun dancado. Krom tio estis diversaj distraj programoj: horkantado, demonstracio de popoldancoj de Anglujo,

Kimrujo kaj Irlando. Fine grupo de virinoj faris demonstracion de gimnastiko.

Dimanĉe la 12an de majo estis la unua oficiala kongrestago. Matene aranĝiĝis Esperantlingvaj diservoj en la katolika kaj en la protestanta preĝejoj, kaj tuj post la diservoj, je la 10a horo, okazis la solena kongresmalfermo. Post humorista bonvenparolado de la LKK-prezidanto, s-ro Horace Barks, la IFEF-prezidanto, s-ro de Jong deklaris la kongreson malfermita.

Poste parolis trafikinspektoro Stuart de la Britaj Fervojoj, la verkistino Marjorie Boulton, la urbestro de Nottingham, kaj fino Prent de la Brita Laborista Esperanto-Asocio. — Parolis ankaŭ profesoro Ivo Lapenna. La resumo de lia parolado estas:

«Malpli da verdaj steloj, flagoj kaj rubandoj kun entuziasmaj agitfrazoj. Anstataŭe pli da ago. — Praktiku Esperanton en via faka tereno, verku kaj traduku artikolojn kaj librojn pri faktemoj en Esperanto, por ke viaj eksterlandaj kolegoj povu lerni de viaj landaj aferoj. Simile: traduku de Esperanto nacilingven. Faru ĉion eblan por ke la artikoloj estu enpresigitaj en la nacilingvaj fakgazetoj. Ne forgesu menciiri «tradukita el Esperanto».

De NEFA, de Norvega Fervoĵista Asocio (Norsk Jernbaneforbund), de Norvega Lokomotivista Asocio (Norsk Lokomotivmandsforbund), — kaj de Norvegaj Ŝtatfervojoj, salutis la prezidanto de NEFA. — Starante ni fine kantis «La Espero»n.

Marde estis kunveno en la vortara komitato. Kion niaj nederlandaj kolegoj jam nun faris en tiu tereno, estas ege impona. Ili pretigis fakvortaron Nederlanda-Esperanto, kiu estas stencile multobligita kaj eldonita kiel tre praktika kajero. Ĝi enhavas proks. 3600 diversajn terminojn.

## ARBO Nova konkurso

Ni jen anoncas novan konkurson, similan al tiu pri «La Suno» en la pasinta jaro. Pasintjare la konkurson partoprenis konsiderinda nombro de partoprenantoj, sed ni esperas ĉifoje pri multe pli alta nombro. Por ke kiel eble plej multaj havu ŝancon partopreni la konkurso estas ankaŭ ĉifoje dividita en plurajn branĉojn.


La temo de la konkurso estas ARBO (atentu bone: *ne* arboj!). Per la ĉikuna foto ni provis montri, ke la arbo ludu la ĉefrolon kaj ke — kompreneble — ankaŭ aliaj arboj rajtas aperi sur la bildo, sed ne kiel parto de la ĉefa temo. Tiun temon niaj legantoj estas invitatitaj pritrakti en jenaj konkursaj branĉoj:

- 1) Originala prozo
- 2) Originala poezio
- 3) Tradukita poezio
- 4) Originala foto nigra/blanka
- 5) Originala foto kolora

Limdato de la konkurso estos 10-a de februaro 1964. Bonvolu skribi sur la koverton «Konkurso Arbo», kaj sendi ĝin al la Redakcio de Norvega Esperantisto, tiel ke via kontribuo estos ĉe ni antaŭ la ĵus menciita dato.

Merkrede dum la unua laborkunsido, la belga reprezentanto de Bruyne invitis al la 16a IFEF-kongreso en Bruselo en 1964.

Venis ankaŭ alia invito al la IFEF-estraro kaj al la delegitaro. Estis la urbestro, s-ro Beddow, kiu aranĝis tagmanĝon, antaŭ ol la solena inaŭguro de nova strato, kies nomo fariĝis «Esperanto Way» — «Esperantovojo».



Fotis: Johan Hammond Rosbach

La konkursaĵojn prijuĝos kiel pasintjare juĝkomisionetoj. — Estos nur unu premio en ĉiu branĉo, kaj ĉiu premio konsistos el jarabono al «Norda Prismo».

Bonan ŝancon! kiel diras la francoj.

Vespere estis la internacia balo, kaj dum tio aranĝo la urbestro ĉeestis, kaj li regalis la tutan kongresanaron per vespermanĝo. Jaŭde dum la dua laborkunsido venis la provizora invito al la 17a kongreso de IFEF en Hamar en 1965. Tiu sciigo efikis ĝojegon kaj multe da scivolemo pri nia lando kaj en unua vico pri la urbo Hamar.



**Kredu, se vi volas**

(daŭr. de p. 101)

Daŭre silentis.

Kiel honesta homo, Stefano, preskaŭ ploropreta, adiaŭis siajn kvardek kronojn. Iu ŝercemulo proponis al Antono bieron en ia pelveto. Antono trinkis. Nu, Stefano pensis, eble tio forigos ĝian hezitemon.

«Mi ne scias, kio okazis pri la parolado, sed vere ĝi povas paroli, kaj ĝi ankaŭ povas kanti.»

«Mi vetos dek kronojn, ke via hundo ne povas kanti.»

Stefano hezitis, sed akceptis tiun veton, kaj kelkajn aliajn.

«Nu, Antono,» li petegis, «ne ridindigu min. Kantu! Ion ajn, sed kantu! Almenaŭ la melodion, se vi ne memoras la vortojn!»

La hundo silentis.

Ĝi daŭre silentadis, kaj Stefano adiaŭis kelkajn pluajn krondekojn.

Li volis tuj hejmeniri, sed eniris lian menŝon la memoro, ke Antono preferis deklami, kaj ke, la antaŭan vesperon, eĉ estis malfacila ĝin haltigi.

«Tamen mia hundo povas deklami poemojn!» li heroe insistis, deprenante kelkajn aliajn bankbiletojn.

Kompreneble pluraj homoj volis veti pri la aserto.

«Nu, Antono, kara hundo, vi tre ĝuas deklamadon..... mi petas..... mi petegas....»

Silento; daŭra silento; nova monperdo.

Ridegoj sekvis ilin, kiam Stefano ekkondukis la hundon hejmen.

«Venu en la banĉambron!» li ordonis. Nigra furiozo kun skarlataj strioj plenigis lian tutan animon. Li serĉis en la blanka ŝranketo, elprenis

malnovan grandan razilon kaj komencis akriigi ĝin sur leda akrigrimeno. Tiam Antono elparolis.

«Kial vi deziras razi vin tiel malfrue vespere?»

«Mi ne razos min. Mi tranĉos al vi la gorĝon. Kial vi perfidis min, hundaĉo, vosthava kanajlo? Kial vi perdis al mi duonon de mia semajna salajro? Jen, vi ne perfidos min duan fojon; mi ellasos en la bankuvon vian vinagran sangaĉon!»

La hundo tuj baŭmis kaj metis la antaŭajn piedojn sur la ŝultrojn de Stefano. Senaplombigita, li faligis la razilon.

«Aŭskultu, stultulo,» la hundo klarigis. «Vi devos baldaŭ iri denove al la sama trinkejo, kie vi kredeble trovos, plejparte, la samajn homojn. Kaj tiam.... ili estos pretaj veti cent kronojn kontraŭ dek!»

Marjorie Boulton

**Norsk Esperanto-Forbund  
(Norvega Esperantista Ligo)**

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.30

Kontoradrese: Nedre Slottsgt. 3 III, Oslo  
Telefon: 42 47 79

Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30—16.30

**Turisma Servo:** Boks 942, Oslo.  
Postgiro 100.32**Esperantoforlaget A/s  
(Eldonejo Esperanto A/s)**

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.31

Kontoradrese: Nedre Slottsgt. 3 III, Oslo  
Telefon: 42 47 79**Cefdelegito de U. E. A.:**S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a,  
Oslo-Bryn. Postgiro 133.29**La redakcio:**

Privata adreso de la ĉefredaktoro:

Johan Hammond Rosbach,

C. E. Holters vei 1 C, Sarpsborg: - Uzu tiun  
adreson, kiam temas pri urĝaj sendaĵoj.

Telefona: 54 7 27